

Tra la Mondo

Tutmonda ilustrata Revuo esperantista

TRA-LA-MONDO-ESPERANTO-SEMAS-SIAJN-BONAJOJN.
PLIFACILIGAS-LA-KOMERCAJN-INTERRILATOJN-KONIGAS.
LA-INDAJN-ELTROVOJN-KUNHELPOS-POR-ANSTATAVI.
DE-FRUKTOBONA-PACO-LA-SANGAJN-BATALADOJN.
KIUJ-DISSTRAS-HOMARON.



Allegorio speciale verkita de Sinjoro Pillel, fama gravuristo de medaloj, sendita en la francan Roman lernejon post ricevo de l' granda premio.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

	Paĝo.
Nuntempaĵoj : Rusa-Japana Milito : konferenco en Portsmouth, de GABRIEL CHAVET (Francujo)	33 ^a
Ĉieaj eĥoj, de Grafo GALLOIS (Italujo) Hedstöm (Svedujo), k. t. p.	35 ^a
Pri Esperanto : La Bulonja Kongreso, de AŬGUSTO MONTROSIER (Francujo)	36 ^a
Kroniko : Bibliografio — La konkurso pri Esperanto de « Les Annales politiques et littéraires »	38 ^a
Infana paĝo : La nacikostuma kongresa balo, de Ing ^o D ^o POURCINES, el Nancio (Francujo)	39 ^a
Diversaĵoj : La vinberistaj festoj en Vevey, de S ^o H. HODLER, el Genevo (Svisujo)	40 ^a
Sportaĵoj : La « Golf » ludo, de S ^{ro} J. T. HAXTON, el S ^t Andrews (Skotlando)	42 ^a
Diversaj Sciencoj (Arĥitekturo) : La Brou'a preĝejo, de S ^o EVROR, el Bourg en Bresse (Francujo)	44 ^a
Artista kaj literatura vivado : W. Bouguereau kaj J. J. Henner (Francujo); Gerard Hauptmann (Germanujo); Tamagno (Italujo); de EŬJENO kaj AŬGUSTO MONTROSIER	46 ^a
Teatra Fako : « La Herezistoj » ĉe antikvaj arenoj en Beziers'o, de FRAŬLINO FLOURENS (Francujo)	47 ^a
Felietono : Rememoroj (sekvo), de KAZI GIREJ (Siberujo).	48 ^a
Miksaĵoj : Por la propagando, amuzajoj, ludoj, k. t. p., de S ^{ro} CH. BRUNET	49 ^a

REPRESO DE ARTIKOLOJ KAJ ILUSTRAĴOJ.

Kelke da niaj kunfratoj esperantistaj kaj ne esperantistaj esprimis al ni la deziron represi niajn artikolojn. Ni volonte tion permesas por artikoloj sed ne por ilustraĵoj, kondiĉe ke oni ĉiam sciigu la devenon de tiuj artikoloj, aldonante la adreson de l' administracio kaj la plenajn prezajn, kondiĉojn :

JARA ABONO : En ĉiuj landoj : 8 fr. — **KVARONJARA ABONO** : 2 fr. 25 c.
UNU NUMERO, AFRANKITA, 0 fr. 75 centimoj.

Esepte, por pago de specimenoj, oni akceptas poŝtmarkojn — *po 3/4 de ilia valoro* — sed nur el landoj ne havantaj internaciajn mandatojn.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

Sendi ĉiujn dokumentojn (*krom miksaĵoj*) al S^o Montrosier, 74 Faubourg Bannier, Orléans, (France). Miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj devas esti sendataj al S^o Brunet, 59, Cours Victor Hugo, Bordeaux, (France).

Sendi mendojn KUN MONO al :

Administranto de « Tra la Mondo », 15, Boulevard des Deux Gares, Meudon (S. et O), France.

Profitoj oferataj de « Tra la Mondo ».

« Tra la Mondo » volas ne sole utili propagandon, ĝenerale, sed ankoraŭ volas helpi propagandistojn, ofte haltigatajn de manko da mono. Kiu varbos ses abonojn ricevos sepan senpage, t. e valoron da 8 frankoj, kaj tiel *po ĉiu serio da ses abonoj*.

Plie GRANDA KONKURSO estas de nun malfermita. Tiu ajn, izolulo aŭ grupo, kiu varbos plej grandan nombron da abonoj ĝis la 31^a de decembro (almenaŭ 30) ricevos 50 frankojn mone. Kalkulante la antaŭan profiton, estas do PREMIO DA 90 FR., tre utilaj por la propagando.

Oni jam legis pri aliaj konkursoj.

KELKAJ SCIIGOJ.

Ankoraŭ dankon ni havas por doni hodiaŭ. Doktoro Gambier, Prezidanto de l' grupo de Loudun kaj gajninto de l'unua premio de l'esperanta konkurso de la grava franca revuo « Les Annales politiques et littéraires », akceptis la delikatan oficon de « *legisto* » por la manuskriptoj ricevitaj.

Aliparte, S^o Boucon, el Nancy, gajninto de l'konkurso de l'fama « Almanach Hachette » bonvolis proponi al ni sian kunlaboradon.

Jen estas do du novaj ŝatindaj akiroj por nia revuo. Cetere « Tra la Mondo » daŭras ricevi multajn kuragiĝajn aprobojn :

« Mi gratulas vin pri via revuo, vere belega ! Ĝi bone sukcesu ! Korege mi tion ĉi al ĝi kaj al vi, kara samideano, deziras. »

Adv^o RAFAELO BAGNULO,
Redaktoro de « Gefataro Esperantista. »

Liallanke, S^o Bolingbroke Mudie, redaktoro de l' jam fama « The Esperantist », skribis al la nia, post lia foriro el Bulonjo, kiun li forlasis antaŭ la finiĝo de l' Kongreso :

Kara amiko,

« Mi ja bedaŭras, ke mi ne gratulis vin pri « Tra la Mondo. » Mi nur vidis ĝin antaŭ mia foriro. Mi trovas ĝin tute bona. »
 BOLINGBROKE MUDIE (Londono).

Oni povas MENDI ĈE « TRA LA MONDO » ĉiujn librojn kaj gazetojn esperantajn. Mendoj estos ĉiam rapide plenumataj.

Aparte oni povas aboni je « Gefataro esperantista » (4 fr. ĉiujare) ; kaj « Espero katolika » (2 fr.). Sufiĉas aldoni 10 centimojn je la kosto de l'abono aŭ de l'volumo.

Pro la pli kaj pli kreskanta nombro de ricevataj petoj pri sciigoj, ni, estonte, respondos nur kaj nepre je petoj akompanataj de poŝtmarko por la respondo.

Ni petas personojn, kiuj ne havas tre gravan kaŭzon por alie agi, aboni kaj abonigi senpere ĉe nia administracio.

Kaj la Septembra N^o de « The Esperantist » favore raportas pri « Tra la Mondo ».

« Mi helpos vin en via entrepreno apud miaj amikoj, kaj en la *Société Scientifique du Chili*, kaj ankaŭ ĉe la *Nacia Societo por Edukado.* »

LUIS E. SEPULVEDA CUADRA (Chili).

« Mi skribas por gratuli vin pri la sukcesinta unua kajero de « Tra la Mondo ». Ankaŭ miajn gratulojn pri la « Unua ĉapitro de miaj memorskriboj », kiun mi plezure estas leginta. »
 C. SNAPE (Bedford), Anglujo.

Abato Peltier dediĉis longan personan artikolon al nia revuo en sia bonega « Espero Katolika », (N^o 20, Septembro). En tiu N^o, amplekse raportanta pri la Kongreso, estas aluditaj gravaj punktoj pri revuoj esperantistaj, punktoj kiujn ni detale preparolos.

« Via nova revuo « Tra la Mondo » tre plaĉas al mi, kaj mi certe faros reklamon por ĝi laŭpove. »

H. HODLER,
Direktoro de « Juna Esperantisto », Svisujo.

Ni povus senfine citi tiajn aprobojn ; tiuj de niaj malnovaj kunfratoj estas aparte agrablaj por ni kaj tre sincere ni dankas ilin.
 « TRA LA MONDO. »



BARONO DE ROSEN
*Eks rusa Ambasadoro
en Tokio.*



Sō TAKAHIRA
*Japana ministro
en Washington.*



Sō WITTE
[Eks rusa finanĉministro.



BARONO KOMURA
Japana ministro de l' fremdaj aferoj.

Rusa-Japana Milito (1)

La konferenco en Portsmouth

de G. CHAVET.

La septembraj gazetoj parolas longe kaj detale pri la konferenco en Portsmouth kaj pri la memorinda traktato kiu finis la kruelan kaj longan militon inter Rusujo kaj Japanujo. Ŝajnas ke la mondo ne ankoraŭ kutimis pri la ĝojo kiun ĝi sentis, sciigante ke tiu sanga terura revo estas malaperinta. La rusa-japana milito daŭris dum dek-ok longaj monatoj; en la nokto inter la 8^a kaj la 9^a de februaro 1904, Admiralo Togo atakis efektive la rusajn ŝipojn en Port-Arthur, sen antaŭa alproklamo de milito; kaj tiu perfida atako komencis la militagojn.

De jam longe, konflikto ŝajnis neevitebla inter Rusujo kaj Japanujo. Japanoj preparis sin por la milito kontraŭ Rusoj, celante tiel venĝi la insulton al ili faritan, per la humiliga traktato de Simonosaki.

De 1895, dato de tiu traktato, la kontraŭrusaj ideoj de Japanoj fariĝis energiaj malamoj. Post la progresadoj de Rusujo en Ekstrem-Oriento, precipe post la sendo de admiralo Alexeieff kiel imperia leŭtenanto, interdiskutoj komencis inter Petersburgo kaj Tokio. Japanujo deziris havi en Koreujo ĉefan influon: ĝi deziris ankaŭ ke Rusujo promesu respekti la teritorian tutecon de Ĥinujo. Rusujo rifuzis, kaj malgraŭ la prudentaj opinioj de markizo Ito, de grafo Inuje, de markizo Jamagata, de grafo Watsukata, kreintoj de la nuntempa Japanlando, milito estis decidata...

Ni ne resumos tie ĉi la furiozajn batalojn kaj ĉiujn malgajegajn faktojn de tiu grandega kaj terura duelo. Kiu ne memoras pri tiuj okazintaĵoj.

(1) Fotog. « Madame et Monsieur »; kl. « Les Annales politiques et littéraires ».

En ĉiu flanko, 200,000 homoj mortis aŭ vundiĝis. En ĉiu flanko, malŝparege, oni elspezis la milionojn, tiamaniere ke nun, la financaj situacioj de la du batalintoj estas egale malbonaj; kaj venkinto estas ruiniginta tiel kiel venkito! Milito mem estas nur uzado de fortoj kaj de inteligentaj aplikataj al detruantaj agadoj. Sed montrinte la kaŭzon de la konflikto, nun ni vidu la finon, la solvon, ni vidu kiamaniere la du persistemaj kaj kuraĝaj militantoj fine akordiĝis.

Stranga fakto! Dum la daŭro de la milito, neniu el la eŭropaj regnoj pensis uzi sian propran influon por provi interkonsenton inter la du militantoj. Tamen mil pacamuloj ne ĉesis paroli pri tio en gazetoj kaj kunvenoj!; tamen, laŭ artikolo de la interkonsentaĵo de La Hago, la propono pri bon-servoj aŭ mediaco povas esti farata, eĉ dum la militagoj kaj neniam devas esti konsiderata kiel ago malmulte amika; tamen Francujo estas amiko de Rusujo kaj Anglujo amiko de Japanujo; tamen la ĉefa intereso de ĉiuj regnoj estis la proksima fino de tiu milito... Malgraŭ ĉiuj bonaj motivoj, dum dek-ok monatoj la diplomatoj silentis, la regnoj rigardis indiferente la ekstreman-orientan duelon. Nur post tiu tempo, regnestro kuraĝis sin intermeti kaj laŭtege paroli pri paco, kaj tiu homo estas prezidanto Roosevelt.

Tiu kuraĝa ago ne mirigis la mondon. Roosevelt estis konsiderata kiel decidema, kuraĝa, energia amerikano; li kutimis havi, en la diplomaciaj aferoj, sintenon malkonfuzan, neflekseblan, kaj energian. Lia propra altrango, la graveco de la granda lando kiun li regas, ĉio tio kaŭzis grandan esperon pri la sukceso de lia klopodo.

Tra la tuta mondo oni pensis: Paco baldaŭ revenos Kaj Prezidanton Roosevelt ĉiuj dankegis.

Cetere, li mirinde aranĝis la aferon. Laŭ lia invito, la 2^{an} de Aŭgusto, S^{roj} Witte, Rosen, de Martens alvenis Nov-Jorkon, kie jam estis la japana senditaro. La 8^{an}, la du senditaroj estis en urbeto Portsmouth, kaj la 9^{an} la interdiskutoj komencis. Ili estis daŭrontaj dudek tagojn.

Facile, Rusoj akceptas la ĉefan influon de Japanujo en Koreujo, la devigon por ambaŭ regnoj forlasi Manĉurion kaj redoni al Ĥinujo ĉiujn specialajn privilegiojn kiujn ili posedas, promeson recipokan respekti la teritorian tutecon de Ĥinujo, cedon de la rajtoj pri Port-Arthur, Dalny, k. c. al Japanujo, cedon al Ĥinujo de la orientaj ĥinaj fervojoj; sed du demandoj ne povas esti solvataj: la demando pri insulo Sakhalino, kaj la demando pri la pago al Japanujo de ĝiaj militaj elspezoj.

« Ni ne donos eĉ peceton da teritorio, kaj eĉ unu kopekon, » diras Rusoj — « Ni volas Sakhalinon kaj tri miliardojn, » respondas Japanoj.

Tiam Prezidanto Roosevelt sin intermetas Li proponas ke Rusujo cedu Sakhalinon kaj ke Japanujo vendu la duonon de tiu insulo po 3 miliardoj, kosto de ĝiaj militaj elspezoj; sed Rusujo rifuzas. Nova propono de Roosevelt: la kosto de la revendo de Sakhalino estos taksata de arbitraciantoj — Rusujo ĉiam rifuzas. Tiam la persistema prezidanto de la Unuigitaj Ŝtatoj sin turnas al Mikado. Tiu ĉi kunvokis eksterordinaran konsilantaron, enhavantan la japanajn antikvulojn, kiu jam estis kunveninta antaŭ la komenco de la milito, kaj tiu konsilantaro eble konsilis prudenton, saĝon. Fine Japanujo akceptis la rusajn kondiĉojn: Rusujo pagos nenion, escepte la elspezojn por la konservo de la rusaj militaj kaptitoj, kaj Sakhalino estas dividata inter la du traktantoj.

La 29^{an} de Aŭgusto, paco estis restarigata. Frenezeco, blindeco de la popoloj! Per tiu traktato, Japanoj ricevas ĉiujn profitojn kiujn ili postulis antaŭ la milito: kaj tamen ili ne estas kontentaj. Ĉu vi kredas ke ili estas ĝojontaj, pensante ke ili ne plu suferos la pezan ŝarĝon de longa kaj kruela milito? Iluzio! Ili ribeladas, ili faras revolucion, ili ne estas kontentaj! kaj samtempe, rusaj ankaŭ ribeladas pro internaj aferoj!

Oni ne konas la verajn kaŭzojn, kaj precipe la financajn kaŭzojn (certe la plej gravaj el ĉiuj) de tiu interkonsento. Oni ĉie parolas pri la angla-japana interligo, ĵus renovigita dum la interdiskutoj, oni studas la financon staton de la du militintoj; sed malgraŭ tio, multe da sekretaĵoj ekzistas en la konkludo de tiu afero. Tamen, oni scias ke mirinda ekzemplo, ekzemplo pri saĝo, prudento, kaj sindonemo al homara bonstato, estas donita de tri homoj kiujn la tuta homaro devas kaj devos ĉiam gratuli kaj dankegi: Prezidanto Roosevelt, Mikado kaj S^{ro} Witte.

Ni jam parolis pri la bela rolo de Roosevelt. La rolo de Mikado ne estis malpli nobla. La japana regnestro havis la kuraĝon iri kontraŭ la sentoj kaj deziroj de siaj regatoj; li havis la kuraĝon resti prudenta kaj saĝa, kiam en la lando ĉiuj frenezigiĝis kaj furioziĝis. Li havis la kuraĝon kontraŭstari la popolan koleron, je l' nomo de la prudento kaj de la homara intereso.

Kaj S^o Witte povas esti, de nun, konsiderata kiel lertega diplomato. Li sukcesis plenumi malfacilegan taskon. Oni memoru pri la klopodoj de Thiers en 1870. Estas malfacile, kiam oni estas venkita, decidiĝi venkinton, ke li forlasu kelkajn el siaj postuloj. Thiers malsukcesis. Witte mirinde kaj lertege sukcesis la entreprenon. De nun, li estas la unua politikisto en Rusujo.

Speciale verkita por « Tra la Mondo »
de GABRIEL CHAVET.

KONFLIKTO SVEDA-NORVEGA.

Oni skribas el Lucerno, la 21^{an} de Septembro, « La Skandinavaj delegitoj ĉe la internacian pacan kongreson en Lucerno certigas, ke Svedujo kaj Norvegujo komisiis baldaŭ la solvon de sia malkonsento je arbitracia juĝantaro, kaj ke ili petus de Svisujo elekton de ĝia prezidanto. »

Pri tiu konflikto, kiu antaŭ nelonge ŝajnis akriĝonta, ni ricevis interesan leteron de Svedo, el kiu ni eltrancis eĉon presitan sur la 35^{an} paĝon.

En tiu letero estas ankaŭ sekvan aj linioj, kiujn ni presas laŭ peto de nia sveda korespondanto, tute pravigita por opinii tiun punkton.

« Rapide mi samtempe volas skribi pri la artikolo (en « *Espero paciŝta* » paĝo 48^a) pri *Rompo de l'Unuigo Sved-Norvega*. Mi ne konas la skribinton de l'artikolo, sed tre erariga esta jena esprimo: « Pro l'absoluta malsimileco de lingvoj, de kutimoj, de stato societa kaj politika — » k. t. p. — : la « malsimileco » en la lingvoj estas tiel malgranda, ke facile povas legi kaj kompreni norvegajn gazetojn sveda malmultklara kamparano. La moneroj havas egalan valoron; kaj « iras » ne malhelpataj: Norvegaj moneroj en Svedujon, kaj reciproke... »

P. HEDSTRÖM, el Rossön (Svedujo).

Ĉieaj eĥoj

Italujo.

Terurega katastrofo en Sicilujo (1).

Granda kaj terura tertremo, kiu detruis multajn vilaĝojn kaj faris milojn da mortintoj, okazis en Sicilujo dum la nokto de la 7^a al la 8^a de Septembro, je la 3^a horo nokte; mi ricevis, de unu el la postvivantoj, rakonton pri tiu ĉi grandega malfeliĉego.

« Mi iris litan, skribas mia korespondanto, kune kun mia edzino je la 10^a horo vespere. La nokto estis neordinare varmega, kaj netolereblaj sulfurodoj plenigis la aeron; pro tio, mi devis malfermi ĉiujn fenestrojn.

Je la 3^a horo matene, mi vekigis pro impreso de granda premo sur la brusto, kaj ŝajnis al mi ke statueto, kiu staras antaŭ mia lito balanciĝas, sed mi supozis trompiĝi.

Ankoraŭ mi ne tute dormis, kiam terura bruo resonis, simile al mil tondroj, kiuj kune resonis, kaj tuj mi perforte terfalas, dum multe da ĝipspecoj plenigis mian buŝon kaj blindigis min. — Tute precizan impreson mi havas nun pri muro, kiu antaŭ miaj okuloj duonparte malfermiĝis; ĝi dum unu momento balanciĝis, kaj falis kun grandega bruo, fortirante parton de l' planko. — Mia edzino, kiu baraktis inter derompaĵoj de la lito kaj multepeza tablo falita sur ŝian dorson, dolore kriegis.

Mi ne scias kiamaniere mi retrovis la ŝtuparon, kiamaniere mi savis min mem, saltante tra ruinaj muroj ĝis la ĝardeno. — Mi nur scias ke mi troviĝis deĵetita teren sub arbo, frostremante pro malvarmo kaj nur vestita noktĉemize; mi tremis je ĉiu nova tertrema skuo, el kiuj mi kalkulis dudek sep! — Mi ŝtopis orelojn por ne aŭdi korbirantajn kriojn de virinoj, kiuj mortigis, kaj la plorojn de infanetoj, kiuj perdis la patronon. — Kiam mi decidis foriri la ĝardenon, la skuoj ne plu estis tiel oftaj, kaj tute finitaj estis la bruoj. — Dum la vojiro de mia domo ĝis la stacidomo, mi kredis tute perdi la spiriton: mi trapasis grandegajn amasojn de ruinoj, el kiuj oni

vidis brakojn, kiuj malespere agitigis por peti helpon, aŭ senformajn restaĵojn de entombigitaj personoj. Tra ŝtonoj ĉiuparte falantaj, multe da virinoj, da maljunuloj kaj da infanoj duonnudaj, sin interpuŝantaj por plej rapide forkuri, ĉirkaŭis min, kaj fortiris min al malfermita kamparo. — La aero estis tute plena je krioj kaj je plendoj; ĉiupaŝe iu falis kaj ne plu releviĝis, ĉar la piedoj de ĉiuj disprenis lin; kelkfoje, tuta grupo malaperis entombigita pro disfalo de muro, sed ĉiu daŭrigis la iradon, nur pensante pri persona savo.

Ĉe la stacidomo plej terura estis la spektaklo: la kadavroj, kiujn soldatoj elprenis sub rubaĵoj, kuŝis funebre sur la fervojoj; ili estis multegaj (kvin cent? eble pli ol mil!) ĉiuj estis nudaj aŭ nur vestitaj per ĉemizo; multe da ili estis

Svedujo.

Nune estas la plej « gravaj horoj » por la Siamaj fratinoj. — La definitiva decido, ne estas ankoraŭ atingita, sed venos plej proksima periodo. En Norvegujo la gazetoj = (Norvegaj) parolas arogantan lingvon, kaj diras ke la propono pri *forigo de l' limfortikaĵoj*, estas ne akceptebla. Plue Norvegoj proponas *arbitracian juĝon*, pri la demando.

Tio ĉi ŝajne estus prava; sed rimarku bone la aferon viditan je Sveda starpunkto: La Svedoj neniam aprobis, aŭ akceptis la Norvegan revolucion rompon de l' unuigo; do, Svedujo ne povas interkonsenti kun Norvegoj, pri arbitraciaj traktatoj antaŭ ol la unuigo estu *leĝe malligita*. Mi eĉ vidas, ke en tiu punkto, la eksterlandaj gazetoj ne tute komprenas la situacion; ĉar ili opiniis proponon pri arbitracia juĝo: ĝuste kaj malkare postulita de Norvegoj, kaj samtempe, eble, ili opiniis Svedojn tro obstinaj?

Kvankam la situacio estas tre serioza, tamen, iaj militaj preparoj en Svedujo ne ekzistas ankoraŭ.

La Norvegoj kredas ke ili posedas eksterlandajn simpatiojn, tio estas: ke iliaj agoj estas aprobitaj de « Grand regnoj. » Tio estas granda danĝero, ĉar pro tiaj pensoj ilia aroganteco kontraŭ Svedujo pligrandiĝas.

La 16^{an} de Aŭgusto.

P. HEDSTRÖM, ROSSÖN

moŝton, Elena de Montenegro: Tiel bona kiel bela, tiel disdonema kiel simpla, ŝi gajnis la simpatian kaj estimon de ĉiuj, dum la vojaĝo farita en Francujon de ambaŭ italaj Geregnestroj, dum la 1903^a jaro.

Mortigo de Advokato Bianchi.

La 30^{an} de lasta Aŭgusto, oni trovis en lia laborĉambro la advokaton Bianchi, kiu defendis leŭtenanton Modugno; li havis la gorĝon tranĉitan je fortega fendo, kiu preskaŭ ebligis vidi la vertebrojn.


La mortiganto, Guido Casale, fama diboĉulo, pseŭdo-farmacia studento, devenanta de Ameriko, sed kiu tamen naskiĝis en Torino, konfesis sian krimon.

Riolumato, la 9^{an} de Septembro 1905.

GRAFO A. GALLOIS.

Ĉe l' Bohema Parlamento.

En Bohemuj preparas la demokratio, antaŭ la baldaŭa malfermo de l' bohema parlamento, grandan bataladon por komuna rajto de sekreta voĉdonado en regna parlamento, en kiun — simile kiel en ŝtatan parlamenton en Vieno — oni elektas la deputatojn laŭ kurioj fiksan la voĉdonrajton laŭ depagoj. La gravecon de tiu batalo kaŭzis la preparita reformo de elektada regularo, laŭ kiu estus nur malmulte pli grandigitaj la rajtoj de la sferoj pli senhavaj. (H. K. B. — Brünn).



EKSPLUATADO DE L' NAFTO EN BAKU (2)

Puloj nun bruladigitaj dum buĉadoj inter Tataroj kaj Armenianoj okazintaj post subskribo de l' Rusa-Japana traktato.

(1) Grafo Gallois ekpatis la nunajn kondiĉojn kaj sendis ĝin al ni sub formo de l' supra impresa rakonto, tradukita laŭ rakonto de postvivanto. Ni petas niajn legantojn tiel fari, aldonante se eble unu fotografon bone elektitan. Tiel la revuo kreskos, kaj per traduko de tiaj nunaj kaj interesaj rakontoj, ĝi helpas la propagandon montrante ke Esperanto havigas bonegan presistron por ĵurnaloj.

(2) *Elirita de l' revuo « Les Annales politiques et littéraires ».*



VOJAĜAJ MEMORAĴOJ.

I.: La transmanika ŝipo « Onward »: ĉe la supraĵo de l' antaŭa masto estas videbla, sub franca flago, la esperanta standardo — II. III.: Antaŭ la foriro el Bulonjo. — IV.: Sur la ferdeko de « Onward » — V.: Alveno en Folkstonon kaj akcepto de la grupestraro (oni vidas nur la silkan ĉapelon de D^{ro} Zamenhof) — VI.: Antaŭ « Town Hall » (Urba domo), kie okazis la oficiala akcepto de l' Urbestro.

En Anglujo.

Longa priskribo pri la vojaĝeto Anglujon ne estas necesa, kiam oni havas por rigardi tiujn multajn vidaĵojn kaj scenojn, kiujn ni povis kolekti dank' al l'afableco de l' aŭtoroj: S^{oj} Caudeville, fotografisto de « Tra la mondo », Duchochois, Baire, Pécheux, k. t. p., nemetiistoj.

Ni diru tamen, ke la jaŭdon 10^{an} de Aŭgusto enŝipiĝis gaje ĉirkaŭe 300 kongresanoj en vaporŝipon « Onward ». Multaj kongresanoj ne partoprenontaj en la ekskurso Anglujen, akompanis la forirontajn ĝis la kajo kaj akklamis lastan fojon D^{on} Zamenhof, feliĉaj vidi la esperantistan flagon (vidu fot. I-an) moviĝi fiere, ĉe la supraĵo de masto, sub la franca standardo: Doktoro Zamenhof vojaĝis kvazaŭ regnestro, kies

specialan flagon — tie ĉi la esperantan! — oni levas, kiam l' enŝipiĝas.

Maro iom maltrankvila ofendetas kelkajn stomakojn; feliĉe, dank'al la mallongeco de l' transmara veturo, la plej bedaŭrin-daj okazantaĵoj estas forigitaj!

En Folkstono, same kiel poste en Dovero, ni estas kore kaj entuziasme akceptataj.

En Folkstona « Town Hall » (urba domo), la kunsido estas aparte solena. Sur granda alta estrado kaj sube, laŭlonge de tri flankoj de granda ĉambrego, estas preparitaj tabloj kun vinoj kaj kukoj.

La urbestro S^o Banks prezidas, havante grandan oran ĉenon

NOMOJ DE KELKAJ VOJAĜINTOJ.

- | | | |
|--------------------------------------|--------------------------|--------------------------------|
| 1. — Doktoro Zamenhof. | 9. — Sinjoro Geddes. | 18. — Sinjoro Ĉefeĉ ŝvinganta. |
| 2. — Sinjorino Zamenhof. | 10. — Barono de Ménil. | esperantan flagon. |
| 3. — Sinjoro A. Southee, Prezo de l' | 11. — Sinjorino Avilov. | 19. — Aŭgusto Montrosier. |
| Folkstona grupo. | 12. — Sinjoro Lephay. | 20. — Sinjoro Bergier. |
| 4. — Sinjoro Finez. | 13. — Sinjoro Cart. | 21. — Sinjoro Carlo Bourlet. |
| 5. — Sinjoro Michaux. | 14. — Sinjorino Finez. | 22. — Rino Pannevin. |
| 6. — Kolonelo Pollen. | 15. — Sinjorino Bergier. | 23. — Sinjoro Achard. |
| 7. — Sinjoro Paul Boulet. | 16. — Doktoro Dor. | 24. — Sinjorino Achard. |
| 8. — Sinjoro Moscheles. | 17. — Doktoro Guyot. | 25. — Sinjorino Pécheux. |



ĉirkaŭ la kolo kaj sur la brusto. Angle li eldiras paroladon, kiun mi tute ne komprenas, sed kiu kredeble estas tre ŝatinda, laŭ la « Ja, ja » aprobaj de la Angloj.

Feliĉe S^o Finez, la lerta kaj tiel sindona franca — angla Esperantisto, tradukas la paroladon komencantan per aludo al belegaj festoj de Portsmouth, kiuj montras konsenton de anglaj kaj francaj maristaroj, esperdonaĵo por monda paco; S^o Banks estas feliĉa vidi Doktoron Zamenhof, kies verko jam faciligas kaj multe pli ankoraŭ faciligos la interrilatojn.

Post respondo de D^o Zamenhof, la urbestro denove parolas. Li toastas je l' honoro de Reĝo Edvardo VII^a, de Prezidanto Loubet, de l' virinoj, de Doktoro Zamenhof, de S^o Péron, la Bulonja urbestro, kaj de S^o Farjon, prezidanto de la komerca ĉambro. Tiu ĉi lasta respondas Esperante, kio elĉenigas entuziasmajn « hip, hip, hip, hurrah! » kriatajn kun akompano de karakteriza skua levigo de l' dekstra brako.

Tiu akcepto estas, cetere, riĉa je temoj por observado pri la manieroj laŭ kiuj Angloj esprimas sian entuziasmon aŭ interon: Jen iuj piedfrapas aplaŭde, jen oni aŭdas « hear, hear » (hir, hir) kiu signifas: aŭskultu, aŭskultu, — por peti atenton de l' ĉeestantaro. Tio ĉi, ekzemple, montras al mi, malfeliĉulo, kiu tute ne scias la anglan lingvon, ke S^o Péron diras interesajn parolojn. Feliĉe poste Kolonelo Pollen, la distinginda prezidanto de *The British esperanto association*, klarigas la enigmon.

Sed la fakto ke unu Bulonja loĝanto ankoraŭ ne parolas Esperante estas por mi tute ne komprenebla enigmo!

En Dovero, kien ni alveturis antaŭ la vespermanĝo, okazis ankaŭ rimarkinda akcepto en belega gotika ĉambrego de la urba domo, sub prezidanteco de Inĝeniero Crundall, anstataŭanta la urbestron malhelpatan de franca-angla kunveno.

Tiu kunsido memorigis min pri la neforgesebla vojaĝo de l' antaŭa jaro.

Certe, tiuj ĉi du anglaj festoj estis tute rimarkindaj kaj varmaj, sed eble iom tro solenaj. La lastan jaron, ni estis ne oficialaj Kongresanoj, sed simplaj Esperantistoj. Eble pro tio, niaj elmontoj estis pli petolemaj. Mi bedaŭris nian promenadon en Dovero, dum kiu ni haltis du aŭ tri fojojn, kantante « La Marseillaise » kaj « The God save the king » kaj ankoraŭ aliajn kantojn, esperante kompreneble.

Kaj mi dezirus, ke dum nia estonta kongreso, ni kunportu multajn naciajn kaj esperantajn standardojn kaj faru ordmarŝadojn pitoreskajn kaj fotografindaĵojn, por ke grandaj ilustrataj gazetoj enpresu vidaĵojn de ĝi.

La ĉi kaŭantaj scenoj estas tre interesaj por ni, Esperantistoj, ĉar ili montras okazintaĵojn speciale rilatantajn *nian* aferon, kaj multe da leŭtenantoj de nia estro. Sed, por la granda publiko, ili ne estas ankoraŭ sufiĉe specialaj por ke oni dediĉu al nia kongreso kelkajn paĝojn de ilustrataj revuoj.


Nu, estas necese ke, iom post iom, ni enpenetru la ilustran revuaron kiel la gazetaron; estas necese ke, kelkfoje, oni raportu desegne pri Esperanto kvazaŭ pri sportoj, kiujn ĝi tiom superas je graveco! Ni estu pitoreskaj en niaj kunvenoj, kaj iom bruaj, kaj ne sole « Tra la Mondo », sed ankaŭ ĉiuj ilustrataj revuoj raportos pri ni.

Vendodon matene, oni vizitis la kastelon de Dovero kaj la havenon. Multaj kongresanoj ĉeestis la alvenon de l' grandega transoceana ŝipo « Deutschland » (Germanujo), kies maristaro precize ribelis post elŝipiĝo en Amerikon.

En nia proksima numero, ni eniros Francujon, trans Kaleso.

En tiu numero ankoraŭ ni presos, kun ĝia traduko esperanta stenogramon de Pastro Schneeberger pri la grandanima parto de l' parolado de D^o Zamenhof rilatanta abaton Schleyer.

A. MONTROSIER.



TRI GRANDEGULOJ.

Doktoro Zamenhof ĉeestas la alvenon de l' kolosa « Deutschland », kiu baldaŭ foriros sur la senlima oceano.



PRI ESPERANTO

Bibliografia Kroniko.

François Coppée: Unua ĉapitro de miaj memorskriboj, esperantigaĵo de Aŭgusto Montrosier. — O. Goldsmith: Ŝi kliniĝas por venki, esp. de A. Motteau. — Charles Dickens: Kristnaska sonorado, esp. de Martyn Westcott.

Inter la multaj verkoj, kiuj amasiĝis en miajn tirkestojn, mi estas devigata fari elekton por komenci tiun rubrikon. Unu ĉarma broŝuro, eleganta kaj bele presita altiras mian atenton. La nomo de l' tradukinto, ankaŭ, ne permesas ke oni ĝin malsatas, ne pli ol tiu de l' originala aŭtoro, la fama franca akademiano François Coppée.

En *Unua Ĉapitro de miaj memorskriboj*, li ame kaj rave elvokas la vizaĝojn de karaj malaperintoj, siaj gepatraj geavoj, kaj laŭ tute ĉarma maniero, la aŭtoro klarigas kiel la miksaĵo de aristokrata patra kaj plebana patrino devenoj igis lin tia, kia li estas:

« De tiuj parencoj (patraj), pri ĝi mi estas certa, venas mia malamego kontraŭ popolaj perforto, mia ledo kontraŭ la demokrata bruteco, mia bedaŭro — volonte mi dirus mia nostalgio — al tiom da aĵoj elegantaj kaj dolĉaj de l' pasinta tempo, per unu vorto tiu instinkta delikateco, pri kiu mi rajte povas fieri, ĉar, en la maldoĉeco de la moderna mondo, ĝi iafoje igas min sufiĉe malfeliĉa. Mallonge, mi estus pura « aristo » sen la influo de l' gepatroj de mia patrino ».

Jen estas kiel la poeto karakterizas la influon de tiuj ĉi:

« Miaj patrinaj geavoj ankaŭ al mi testamentis, mi esperas, iom da sia morala tresoro, tio estas la popola saĝo, la gusto al la vero, kaj precipe la respekton por la laboremuloj kaj la amon al la humiluloj. »

Kaj li tiel konkludas:

« Dank' al miaj prapatroj — tion mi firme kredas — mi estas rafinitulo, kiu plezure apudestas simplanimulojn, aristokrato kiu amas la popolon, kaj en tiu ĉi unua ĉapitro de miaj memorskriboj, kiu sendube estos la sola, por mi estas hodiaŭ dolĉe, doni al la du Parizaj familioj, el kiuj mi devenas, dankan, ameman kaj respektan memoron. »

La plena rakonto enhavas ĉarmajn pentraĵojn intimajn, kaj vivajn ekvidadojn pri la epoko de l' franca revolucio. Antaŭparolo, en kiu S^o François Coppée parolas favore pri la konsekvencoj de la disvastiĝo de Esperanto por la konservado de la naciaj lingvoj, malfermas tiun ĉarman libreton.

Post tiu tro mallonga analizo, oni ne estos surprizata legante la jenan leteron skribitan al S^o Aŭgusto Montrosier, de Doktoro Zamenhof mem. Tiu letero rilatas ankaŭ alian gravan rezultaton atingitan de nia ĉefredaktoro.

Kara Sinjoro,

Kun vera plezuro mi legis la sciigon, ke vi sukcesis ekinteresi por nia afero la gravan revuon « *Les Annales politiques et littéraires* » kaj ke vi faras kurson en tiu revuo. Tio ĉi estas tre grava akiro por nia afero, kaj ĉiuj esperantistoj, kiuj jam de longe konas tre bone vian senlakan kaj tre fruktoportan laboradon por nia afero, tre alte ŝatas tiun ĉi vian novan meriton. Ankaŭ al la dirita revuo mem ni ĉiuj estas tre dankaj por tio, ke ĝi montris sin tiel progresama kaj havis la kuraĝon doni sian potencon apogon al la afero, kiu povas sendube alporti grandegan utilon al la homaro, sed pri kiu la plimulto de la aliaj revuoj ne havas ankoraŭ sufiĉe da kuraĝo, por montri sin publike kiel ĝiaj partianoj.

Grandan servon vi faris ankaŭ por nia afero per tio, ke vi ekinteresis por Esperanto la glorvan François Coppée kaj ricevis de li la permeson traduki esperante lian « *Le premier chapitre de mes mémoires* » kaj vi ricevis de li ankaŭ la konfeson, ke en Esperanto li vidas ne malamikon por la ekzistantaj lingvoj naciaj (kiel krias niaj miopaĵ kontraŭuloj), sed kontraŭe, la plej bonan ŝirmilon, por gardi la naciajn lingvojn de konstanta difektigaĵo.

Via nun eldonita traduko de la verketo de Coppée poros esti bona propagandilo en la manoj de la Esperantistoj

Via,
L. ZAMENHOF.

Plua komentario estus superflua (3).

El Anglujo ni ricevis du tre interesajn verkojn: Ŝi kliniĝas por venki, de S^o Motteau, la konata kunlaboranto de l' bonega angla revuo « *The Esperantist* », tradukinto de l' fama verko

de l' glora Shakespeare: *la Ventego*; kaj *Kristnaska sonorado* laŭ la ne malpli konata Ch. Dickens, tradukitan de S^o Martyn Westcott, prezidanto de l' Hastingsa Grupo.

Ŝi kliniĝas por venki, kvinakta komedio, helpis multe por starigi la famon de Olivero Goldsmith kiel dramverkisto.

La agado ripozas sur eraro (kiproko) pri diversaj personoj de la komedio, aparte la heroino. Pro tio la komedio memorigas la faman francan teatraĵon « *La ludo de l'amo kaj de l' hazardo* » de l' delikata franca aŭtoro Marivaux, sed, dum en tiu lasta la eraro estas vola, estas tute malsame en la komedio de Goldsmith. Tie ĉi, efektive, la personoj estas trompataj de malica bubo, ne ĉiam bona kaj ĝentila, kiu aparte ne estas tre inda filo. Tamen ĉar li helpas la geamantojn, kaj finigas la komedion laŭ la deziro de l' publiko aŭ de l' leganto, oni pardonas liajn petolojn al Tono Lumpkin, kies nomo sufiĉas, diras S^o A. Motteau en sia enkonduko, por ridigi ĉiujn angleparolantojn.

La traduko estas bona kaj interesa. Nur eble oni povus iom bedaŭri ian trouzon de afiksoj. Sed, resume, la verko estas tute leginda kaj ni rekomendas ĝin al personoj dezirantaj koni la faman verkon de Goldsmith (1).

Pri *Kristnaska sonorado*, mi ne povas multe paroli hodiaŭ. Mi nur diras ke la verko elektita de la tradukinto mirinde karakterizas la talenton de Ch. Dickens, kaj ke oni tute sentas la ĉarmon, la delikatecon kaj la « humur » on de l' fama angla verkisto tra la esperantigaĵo (2).

Mi deziras citi, fine, verketon de S^o Saint Loup, ekspredizanto de l' Bizonta grupo (gr. de Besanzon) kiu en sia fantaziaĵo: *La nojzara donaco de Ministro*, vidigas al ni kontentigan estonton en kiu la ministro de l' publika instruado ordonas enkondukon de Esperanto en liceojn kaj suprajn lernejojn, kun kialoj plej honoraj por Esperanto.

KONKURSO PRI ESPERANTO

de « *Les Annales politiques et littéraires*. »

Tiu grava literatura revuo ne kontentigis oferante kurson pri Esperanto al siaj 100,000 abonintoj. Laŭ instigo de S^o Montrosier, ĝi proponis al ili konkurson, kies unua premio konsistis el vojaĝkosto Bulonjon por la esperantista kongreso.

La gajninto de tiu bela premio estas Doktoro Gambier, prezidanto de l' Grupo de Loudun, kiu verkis interesan supozitan komunikacion por la Kongreso, pri movado esperantista. Malsano ne ebligis por li ĉeestadon en la Kongreso, kie lia malproksimo estis tre bedaŭrata.

800 frankoj kiel premioj estas disdonitaj inter la aŭtoroj de plej bonaj verkoj, kiuj estas:

1^a Premio: D^{ro} Gambier. — 2^a Premioj: Soj Melot, Valenciennes, kaj Tournier, instruisto, Possiat (Ain). — 3^a Premioj: Soj L. Dupin Fichot, Cravant; Cestre, Prez^o de l' grupo de Auxerre, Kapitano X (aleziano), Toul. — 4^a Premioj: Soj H. de Ladevèze Seko de l' Hamburga grupo kaj Doré, Prez^o de l' grupo de Troyes. — 5^a Premioj: G. Chevalier, Paris; S^{ino} Ernest Garnier, Vitry-le-François. — 1^a Subpremio: Fino Yvonne Joulin, (Orléans). — 2^a subpremioj: Leŭtenanto Sabattier, Fontainebleau. — S^o Henri Roussot, Pr^o ĉe la liceo Condorcet. — 3^a subpremioj: Finoj de la Serre, Tonneins; kaj Genevieve Marchal, Fontenay aux Roses.

Citoj: Soj Ballereau, arkitekturo en Luçon; Villiard, instruisto ĉe Ifri (Kabilio); S^{ino} Chautard, instruistino en Colombe (Isère); S^o Richon (Parizo); S^o Bonfils, Charleville; S^{ino} Valentine Giboutol, Nolay; Odile Prudent, Paray-le-Monial; Solichon, en Belad, Hungarujo; S^o M. G. H. Schober, Nantes; S^o Mende, Alĝero; S^{ino} R. Bertrand, La Combe (Gard).

Al kiuj ricevis citon « Tra la mondo » donacis la tri unuajn numerojn de la revuo.

Ni konsideras ke estus tre bone, ke en niaj naciaj gazetoj oni multe parolu pri tiu konkurso. La antaŭaj diroj de nia majstro pravigas tute atentinde tiun opinion.

LEGADAMIKO.

(1) 2f. 70 afrankite. — (2) 1f. 50 afrankite. — (3) Fr. 0,75 afrankite. Ĉiuj aĉeteblaj ĉe « Tra la Mondo ».

La nacikostuma balo en Bulonjo

De Inĝeniero Doktoro POURCINES, el Nancio (Francujo).

La vesperon de l' festeno, pri kiu estas raportite en la antaŭa numero, okazis tre brila balo en la Kazino. Multegaj estas la ĉeestantoj, formantaj amason tute variegan pri kostumoj, kiam alvenas gesinjoroj Zamenhof, aplaudataj kaj aklamataj de centoj da manoj kaj buŝoj.

Kaj vere, la personoj okupantaj la publikajn salonojn de l' Kazino, aparte la superajn galeriojn, de kiuj oni subvidas en la balan ĉambregon, estas devigataj konfesi ke estas tie io neordinara.

De la estrado kuŝanta je ekstremajo de la ĉambrego, kiu estas la elektita loko de Doktoro Zamenhof, estas kurioza kaj neforgesebla la vidaĵo.

Multaj personoj survestis efektive sian nacian vestaĵon, tiamaniere ke, kontraŭe je ordinaraĵ kostumaj baloj, en kiuj la vestoj solaj malsimilas, la portantoj povus tie ĉi, se ili volus, restarigi la faman Babelturon, uzante sian nacian lingvon. Sed neniu pritiopensas Ĉiuj estas ja tro kontentaj interparoli facile per la sola kaj kara Esperanto, kies mirindan taŭgecon por interrilatoj elmontregas la diverseco de l' kostumoj.

Mi rimarkas efektive, promenante rave en la ĉambrego, la jenajn diversajn kostumojn. Bonvolu la forgesintoj senkulpigi min; la ĉeestantoj ĉe la balo estis tiel multaj, ke eble mi ne vidis ĉiujn.

Karolino Codorniu, filino de nia atabla, fervora kaj lerta hispana kunlaboranto, Ĉefinĝeniero Codorniu, surmetis la kamparanan kostumon de la ĉirkaŭaĵo de Murcio (4); Fmo Cederblad, nia tiel lerta sveda kunlaborantino, tiun de la provinco Södermanlanda, ne malproksime je Stockholmo: la grandaj pintoj de ŝia kufo ŝajnas du flugiloj ombrigantaj ŝian ridetan vizaĝon. Fmo Libersat, vestis sin per Arles'anina kostumo (Francujo); ĝentilaj knabinoj Geneviève (1) kaj Thérèse (3) Bergier portas la kostumojn Svisan (Lucernanino) kaj Britan; ilia pli granda fratino Madeleine vestis sin kiel la Slovakinoj (5). Eveline Farnes alvenis tuj de la komenco de l' balo, fiere



Estas videblega, ni pensas, nia deziro plene kontentigi tiujn, kiuj donis al ni sian konfidon. Dua kaj tria numeroj, pro la granda kaj ĉiam kreskanta nombro de l' ilustraĵoj, estas por ni tre granda mona ofero. Ni do petegas niajn abonintojn kaj legantojn, ke ili kiel eble plej ageme klopodu por



Fot. Candevolle.

1 8 12 13 14 15
2 9 3 10 5 11 6 7
Doktoro Zamenhof Sinjorino Zamenhof

KELKAJ KOSTUMOJ FOTOGRAFITAJ POR « TRA LA MONDO ».

kostumo kaŭkaza, kiuj afable dancis « Lezguinka », georgian dancon de Tiflis, energie akompanitaj fortepiane de Sinjorino Bergier kaj de taktataj krioj kaj manbatoj de tre interesataj ĉeestantoj.

Tiu rimarkinde sukcesinta balo lasos neforgeseblan memorajon en la spirito de ĉiuj.

ING^o DR^o POURCINES.

Ni povas plenigi la artikolon de nia distinginda kunlaboranto donante nomaron de diversaj lingvoj aŭ idiomoj riprezentitaj dum la kongreso, sciigon viditan nenie. Jen estas ili:

Angla, Skotlanda, Irlanda; Franca; Germana; Itala; Ĉeka; Maĝiara; Bulgara; Holanda, Flandra, Valona; Hispana, Katalunja; Rusa, Pola, Fina; Sveda, Norvega.

Tiu sciigo estas ŝuldata al Sinjoro Derveaux, la sindona sekretario de l' Kongreso, kaj al S^o Duchochois ankaŭ ĉiam preta por fari servon. A. M.



GESINJOROJ AVILOV.

dancantaj la georgian « Lezguinka » el Tiflis.

pligrandigi la nombron de niaj abonintoj. Ĉiuj povas esti certaj ke la revuo vivos. Do ili povas sentime ĝin propagandi.

Krom profitoj proponitaj al niaj favorantoj, kaj jam akiritaj de kelkaj, ili havos plezuron vidi « Tra la Mondo » plibeliĝi kaj pli kaj pli ampleksiĝi.

Vinberistaj Festoj en Vevey.

de H. HODLER (Svisujo).

La festo de la Vinberistoj, kiu okazis en Vevey komence de Aŭgusto, kun la plej granda sukceso, estas unu el la plej famaj solenaĵoj svisaj, kaj ĝi estas esence svisa, ĉar ĝi estas popola kaj demokrata — ĉefa karakterizo de la naciaj festoj.

La naturo de la loko kaj ĉirkaŭaĵoj de Vevey tuj klarigos la kialon de tiu festo, kiu enradikiĝas en la hejma tero mem. Vevey, ĉarma urbeto da 12.000 loĝantoj, sidas borde de l' lago Lemana; kiam oni veturas el Lausanne ĝis la ekstremaĵo de l' lago, la vojaĝanto vidas dekstre kaj makdekstre de la vojo montetojn varmigatajn de la sunradioj kaj ĉie kovratajn de vinberoj. La precipa riĉeco de tiu regiono konsistas el la vinoj; la plej multaj loĝantoj posedas pli-malpli multe da tero, kie ili kulturas vinberon. Oni do ne devas miri, ĉar la ĉi-tieuloj festas tion, kio havigis prosperecon kaj riĉecon al la lando.

.

Se oni kredas la tradiciojn de la vinberistoj, tiuj festoj havas tre malnovan devenon, sed nenion precizan oni povas diri pri tio. En la XVII^a jarcento la vinberistoj kuniĝas en korporacion, kiu iom post iom kreskis kaj prosperiĝis. Je tiu epoko, komencas modestaj festoj, kiuj precipe konsistas el festenoj; tamen oni jam prezentas figuraĵojn kaj ludojn, rememorigantajn pri Mitologio kaj Kristanismo samfoje. De la finiĝo de la XVIII^a jarcento, la festo pligrandiĝas. Oni organizas teatraĵojn laŭ la plano ankoraŭ nuntempe sekvata: la kvar sezonoj del' jaro kun Pales, Ceres, Bacchus, la falĉistoj, la grenistoj kaj la kamparaj scenoj. La famo pri tiu festo disvastiĝas malproksimen kaj je ĉiu nova prezentado (1833, 1851, 1865, 1889), Vevey akceptas pli grandan nombron da vizitantoj.

.

La ĵusa festo, kiu daŭris de la 4^a ĝis la 11^a de Aŭgusto, havis grandegan sukceson. Ses prezentadoj okazis; la konstruitaj estradoj povis enteni 12.500 vidantojn kaj la ses fojojn ili estis tute plenaj. La poemon de la festo oni ŝuldas al talenta poeto, S^{ro} René Morax, la muzikon al verkisto G. Poret, ambaŭ Svisoj. La aŭtoroj sukcesis liveri valoran verkon, kvankam respektante la tradiciojn. La festo de la vinberistoj fariĝis efektive festo de la naturo, solenaĵo gloranta la terlaboradon kaj la penojn de la laboristoj, kvazaŭ sintezo de la terkulturado. Kaj al tiu festo partoprenas iamaniere preskaŭ la tuta loĝantaro: viroj, virinoj, infanoj, junuloj kaj maljunuloj, ĉiu havas sian oficon, ĉiu devis multe laboradi



ORDA MARŜO D



LA ĈARO DE PALES.

Meksikujo.

En nia dua numero, ni citis la ekzemplon de nia fervora samideam S^o Kŭchler, la « Meceno » de Esperanto en Frankfurto, kiu subskribis 6 abonojn de « TRA LA MONDO » por la propagando en publikaj lokoj.

Hodiaŭ, ni povas doni alian ekzemplon similan. S^o Morin, l'agema propagandisto en Meksikujo, petis de ni dek abonojn en la sama celo, kaj li skribas ke li penados, aliparte, varbi abonojn.

Plie li sendas al ni aron de belegaj kuriozaj fotografajoj, dank' al kiuj ni povos *vidigi* interesajn morojn kaj kutimojn meksikajn.

Ni memorigas ke ni ne daŭras sendon de abonoj ne pagitaj.

Ĉiuj bonvolu sendi la monon: poŝta enspezo necesigas por ni laboron neblan pro manko da oficistoj.



LA KOMENCO DE L' PREZENTADO.

ilustraĵoj estas ĉer-
Annales politiques et
plej grava el ĉiuj la
nuaj revuoj,

kun siaj pastroj kaj faŭnoj: la korbinistoj dancas kaj baldaŭ ilin ĉirkaŭas la baletoj de la mortintaj folioj, la rikoltistoj aperas laborante, la vinberistinoj tranĉas la berarojn, metotajn sub la premilon; tiun akton finas la danco de la faŭnoj kaj faŭninoj ebriigitaj de la dolĉa vino. Ĉiuj ludantoj kuniĝas sur la scenejon kaj kantas al la laboro de la tero, kiu fortigas la popolojn kaj ĝojigas la korojn.

Oni malfacile povas prezenti al si la imponantan grandecon de tiu spektaklo, ne vidinte la harmonion de la kostumoj kaj de la koloroj, la ĉarmajn scenetojn kiel tiujn naivajn dancojn infanajn, la mirindan aranĝon de la grupoj, kaj precipe la grandan penadon volonte akceptitan de multaj bonvoluloj por la sukcesigo de tiu elmontrado. Tiu festo, oni prave diris, estas reviviĝo de la antikvaj solenaĵoj; ĝi estas ankaŭ kaj ĉefe oferado al la naturo, glorigo de la laboro, esprimo de la ĝojo pro la vivo; ĝi havas en si mem sian moralon kaj sian instruon. Ĉu tia ne devus esti la celo de ĉiuj festoj? H. HODLER, Genevo

Ĉefredaktorio de « Juna Esperantisto. »

Nia abona konkurso.

Kredeble li havos grandan sukceson. Pri pensu do!: Premio da 90 frankoj, almenaŭ, inter kiuj 50 frankoj mone, ne estas malŝatinda.

La grupoj komencas moviĝi. Por ili estas facile varbi almenaŭ 6 abonojn, kaj tiel ricevi senpage por siaj anoj nian revuon. Tio ĉi ja meritas, ke la grupestraroj iom klopodu.

Kurso pri Esperanto.

Ni konsilas uzadon de « Esperanto en dix leçons » aŭ « Grammaire et exercices de la langue Esperanto » plenigataj de l' bonega kurso de « Annales politiques et littéraires ».

Kajkiel verketo por legi kaj interesi la lernantojn: « Unua ĉapitro de miaj memorskriboj », malkara, facile legebla kaj tre interesa.


La kvaronaraj abonintoj, kiuj deziras daŭrigi sian abonon estas petataj TUJ sendi la pagon por estontaj numeroj.



LA PRINTEMPA BALETO.



ERISTINO.



3. ENTRUIGANTE LA PILKON.

Mullenombra ĉeestantaro rigardas unu el la plej famaj golfludistoj.

La " Golf "-ludo en St Andrews (Skotlando)

de J. T. HAXTON.

La Ludo estas trajto de la nuna tempo. Pli kaj pli da atento oni donas al ludoj, sed mi dubas ĉu iu ajn ludo estas progresinta tiom en populara favoro, kiom tiu, kiu estas la temo de tiu ĉi artikolo.

Tial, estimata leganto, vi deziras fari provon de tiu ĉi populariĝanta ludo kaj, kompreneble vi venas al St-Andrews, Skotlando, kiu estas la vera hejmo de la ludo: sed tie ĉi ĝi estas pli ol ludo, ĝi estas komerco ĉar centoj da viroj ekzistas nur per ĝi.

Alveninte tien ĉi, vi ricevas pilkon kaj bastonojn, nomitajn « clubs » (elparolu: klabs). La malgranda pilko, pezanta ĉirkaŭe 60 gramojn (2 ozs), estas farita el gutaperko kaj estas blankekolorita.

La bastonoj konsistas el la « kapo » farita el malmola ligno, pezigita per plumbo, kaj la tenilo, longa ĉirkaŭe unu metron, farita el fleksebla ligno kaj havanta ĉirkaŭe kvar decimetrojn ĉe la fino, kovritajn per mola ledo. Kelkaj el la « clubs » havas la kapojn faritajn el fero.

Ni estas nun sur la herbejoj, ĉe la komencejoj kaj tie ĉi ni trovas grupon el « caddies » (elparolu *kadis*), bastonportantoj, kiuj deziras porti por ni niajn ludilojn. Ni trovas kelke da aliaj ludontoj atendantaj por komenci; kaj ni rigardas dum ili forpelas siajn pilkojn. Ni rimarkas kiel la ludanto sin metas antaŭ la pilko, celante ĝin kiel en la unua



RIGARDATA DE SIA FRATINO. — PREPARANTE LERTAN FRAPON.

Fot. Haxton

1. Celante la pilkon.

2. Ĵus frapegonta.

(1) Kiu povos priskribi interesajn naciajn sportojn bonvolu ĝin fari. — Plezure ni ricevos tre interesajn ĉhojn sportajn kun folografajo.

ilustraĵo; tiam, suprenprenante sian bastonon kiel en la dua ilustraĵo li malsuprenigas ĝin, frapante la pilkon kun plena forto. La pilko flugas fajfante je surpriziga longeco, (bona golfanto povas ĝin peli ĝis pli ol 200 metroj)

Dum ni atendas, kelkaj adeptoj komencas sian ludon kaj ni ekpensas ke golfi estas facilegaĵo; sed nun antaŭstaras neadepto, kaj kiam li duonfrapas sian pilkon, ni dubas ĉu la ludo estas vere tiel facila.

Fine estas nia vico; ni sentas nin tre nerva, sed ni estas decidinta ludi bone. Ni staras kaj celas kvazaŭ adeptoj, kaj simile forte frapas, kiam — jen! — ho ve! — ni estas tute malfrapinta la pilkon.

Ni ree provas, kaj duafoje ni iom frapas ĝin, kaj tiel frapante, duonfrapante, malfrapante, ni iras la unuan truon, kiu estas malgranda — tro malgranda — nur dekdu centimetrojn tra, kaj montrata per blanka standardo. Ilustraĵo 3 montras la metodon entruigi la pilkon.

Fine ni estas entruiginta la niajn, sed ni estas preninta dudek frapojn kaj ni tre envias tiujn, kiuj postulas nur kvar aŭ kvin; tamen oni ne konstruis Romon dum unu tago; tial ni forte esperas.

Tiel la unua truo! Plena rondo konsistas el dekok truoj — preskaŭ kvar mejlojn — kaj dum nia vojaĝo ni devas transiri dufoje unu rivereton kaj eviti multe da sablotruoj.


Post multe da laboro ni finas nian rondon sed la pilko ne estas nun blanka, kaj nun ni ne pensas ke golfo estas facila, sed postulas multe da lerteco. Malgraŭ tio ni estas entuziasmaj, kiel preskaŭ ĉiuj kiuj provas la ludon. Golfo estas saniga ludo, kuniganta marŝadon kun brakmovado en la libera aero; plue ĝi estas treege interesa.

*Originale verkita de
J. T. HAXTON.*


Sportaj eĥoj.

Nia granda kunfrato «*La Dépêche de Toulouse*», unu el la plej gravaj provincaj ĵurnaloj francaj, organizis tre sukcesintan kuradon de aŭtomobiloj, kies vojaro malvolviĝis en belega regiono de Pireneoj.

La du ĉi-sube vidaĵoj memorigos al kelke da niaj legantoj la similan provon, kiu kaŭzis la kalaisan kongreseton, kies sukceso naskis nian Bulonjan kongresegon.



LA « POKALO » DE PIRENEOJ.
Unu kiu ne trafis la celon.



KURADO DE AŬTOMOBILAJ ŜIPOJ EN BULONJO-S-MARO.
Rapidegirante. Kelkaj konkurantoj.

Fot. Baire.

EN LA HONORA LEGIO.

Sinjoro Michaux, prezidanto de la Esperantista Bulonja grupo, informis nin pri vizito farita al li de l' Prefekto de l' departamento de Pas-de-Calais, sciiganta ke Doktoro Zamenhof estas nomita «*Kavaliro en la honora legio.*»

Ni ĝojegas pri tiu ŝata pruvo donita al nia lingvo, kaj tiu estimatesto ricevita de nia kara majstro. Ni esperu, ke ĝi estas nur komenco, kaj ke aliaj regnestroj sekvos tiun ekzemplon, atendante ke Doktoro Zamenhof ricevu Nobel'an premion, kiu neniam povos esti pli bone aljuĝata.

TUTMONDA SOLIDARECO.

Sinjinoro Junck el Bordighera, petas ĉiujn Esperantistojn montri per videbla kaj ŝatinda maniero siajn nombrojn kaj solidarecon, monferante por malfeliĉaj suferantoj sekve de l' Kalabra kaj Sicilia tertremoj.

Estus bonege, ke la monfero de Esperantistaro estu altvalora, kaj ke ĉiuj landoj partoprenu en ĝi. Krom bonfaro, tio estus bonega kaj laŭdinda propaganda rimedo.

Oni sendu kotizaĵojn, eĉ la plej malgrandajn, al So Lambert, redaktoro de *Esperanto*, 10 rue Berbisey, Dijon, France.

La Brou'a preĝejo.

de M.-J. EVROT. (*Sekvo kaj fino.*)

Tri maŭzoleoj el blanka marmoro okupas la mezan spacon inter la seĝegaroj kaj l'apsido. Meze de la ĥoro staras la maŭzoleo de princo Filiberto; maldekstre, tiu de Margarito de Aŭstrujo, lia edzino; dekstre, tiu de Margarito de Burbono, lia patrino.


Tiuj tri personajoj kvazaŭ ludas senparolan scenon. Filiberto, kuŝanta en la mezo, komunikaskun la du aliaj. Margarito de Burbono sin turnas al sia filo por rekomendi al li la plenumon de sia religia promeso malhelpitan de la morto. Filiberto, per siaj manoj kunmetitaj kaj klinitaj al sia patrino, vidigas ke li prenas sur sin tiun gravan devon; sedsamtempe, li direktas la okulojn al Margarito, sia edzino, kvazaŭ dirante: « Ho ve! mi ne povas plenumi mian promeson. Kvankam juna kaj forta, mi mortigas. Akceptu viavice la sanktan heredon, kaj starigu monumenton indan je nia nobelrango. »

Sub arkaĵo kavigita en la muro, Margarito de Burbono, vestita per dukina mantelo, kun krono sur la kapo, kuŝas, havante la manojn kunmetitajn, la piedojn sur leporhundino, la vizaĝon turnatan al sia filo. La maŭzoleo estas ornamita per niĉoj enhavantaj geniojn kaj plorantinojn, kies kapoj, kvankam vualkovritaj, estas delikatege kaj riĉege skulptitaj.

Antaŭ la ĉefaltaro staras la duetaĝa maŭzoleo de Filiberto. Iom supre de la marŝejo oni vidas unue la princon malvivan, preskaŭ tute nudan, iom pli grandan ol la natura kresko. Dekdu subteniloj aŭ faskoj da fadenformaj kolonetoj, riĉigitaj per niĉoj, statuoj kaj miregigaj kapricoj, subportas platŝtonon el nigra marmoro, kie ripozas Filiberto armita kaj kronita; brodita kitelo tegas lian kirason; lia kapo

estas apogita sur riĉega kusenon, liaj piedoj sur leono. Ses anĝeloj lin ĉirkaŭas en ĉarma kaj malĝoja sintenado. Unu tenas la sceptron kaj la ganteĝojn de l' princo; unu lian kaskon kaj fraparmilon; du portas surskriban marmoran tablon; la du lastaj ŝildon kun la insignoj de l' Savoja duklando. La statuetoj de tiu monumento estas ĝenerale ŝataj kiel la plej perfekte elfaritaj.

La maŭzoleo de Margarito de Aŭstrujo estas multe pli granda kaj malsimpla ol la unuaj. Ĝi diferencas precipe per la multego de siaj ornamajoj. Tie ankaŭ la princino estas dufoje prezentita: unue malviva, sur malalta platŝtono; due viva, kun la brakoj krucmetitaj, sur tablo el nigra marmoro subportata per arigitaj kolonetoj. Ĉe ĝiaj flankoj staras kvar genioj. Kvar faskoj da nervaĵoj kaj kolonetoj, suprenirantaj de la malsupraj anguloj de l' maŭzoleo, utilas kiel subteniloj al larĝa baldakeno kovranta la tuton. Sur la kornico estas skulptita la fama devizo de la princino: FORTVNE INFORTVNE FORT VNE, kiun kelkaj verkistoj klarigas tiamaniere: la sorto malfeliĉigas treege unu (virinon) (1). La luksegaj detaloj de l' skulptaĵoj, la delikategeco de l' ĉizado, la origi-



Kl. Do Nodel.

UNU AL STATUCTOJ DE L' MAUZOLEO DE FILIBERTO LA BELA.

naleco de l' motivoj, la nekredbla fantazio desegninta, teksinta, knedinta la nervaĵojn, la emblemojn kaj la branĉetojn kormovas eĉ la malplej senteman rigardanton.

Apude, post la altaro de la Virgino, vastega plenreliefo (alta je 5^m67, larĝa je 4^m) fake-dividita, riprezentas la sep ĝojojn de Mario. Tiuj scenoj estas montritaj kvazaŭ en ĉambretoj unuflanke malfermitaj. La lukso, la eleganteco de la meblaro malmulte

(1) Tiu devizo estas dissemita sur ĉiuj partoj de l' monumento: muroj, tomboj, lignaĵoj kaj vitlaroj; latine: fortuna infortunat fortiter unam. Per tiu devizo, Margarito aludas sian trioblan vidviniĝon 1^o je la reĝo de Francujo Karlo VIII; 2^o je la reĝido de Hispanujo; 3^o je la dukino de Savojo Filiberto la Bela.

konvenas al la humila edzino de Jozefo; ŝia lito, ekzemple, estas vera dukina lito, kaj la ŝtofoj ĝin kovrantaj memorigas pri la lukso de l' riĉegaj burĝinoj de Gento kaj de Bruĝo dum la XVI^a centjaro. Ne estas bezone diri ke, pro la delikateco de l' temoj, la varieco de l' detaloj kaj ornamaĵoj, tiu tabernaklo estas mirindaĵo.

Fine mi devas mal-longe paroli pri la kvin belegaj vitraroj de la ĥorejo. Tiuj facilrompeblaj ĉefverkoj, feliĉe respektitaj de l' tempo kaj de l' homoj, brilas senkompare pro la korekteco de l' figuroj, la perfekteco de l' formoj, la magieco de l' koloroj. Oni precipe distingas la grandan centran vitraron kiu riprezentas la kronadon de la Virgino, kaj la vitraron de la tiel nomata « kapelo de Gorrevod » kies temo estas la senkredemo de Sankta Tomaso.

Ĉio, kion ni supre diris pri la Brou'a preĝejo povas rememorigi pri tiu monumento la jam vidintojn, sed tute ne doni pri ĝi sufiĉan ideon al la nevizitintoj: ĉi tiuj povas malfacile imagi la poezian impreson de ĝiaj cent mirindaĵoj harmoniigataj pli ol lumigataj per la mistera velurkolora lumo englantanta tra la vitraroj.

Pro ĝia deveno kaj arĥitektura karaktero, Brou estas esence transira verko inter la Mez-

Renaskiĝ-epokoj. Sendube, konstruita por ŝirmadi tombojn, ĝi estas religia kaj pieca verko. Sed se vi rigardos, kiel arte la ŝtonoj ekfloras kaj disvolviĝas

en multekostajn punktojn, kiel belege la taĝlumo gajigas tiun noblan arĥitekturon, vi konfesos ke ĉi tie la morto fariĝis ridetema kaj forlasis siajn terurigojn. Malvarmeta bloveto traflugis ĉi tien de la bordoj de l'Arno kaj de l' Tibero. La arto senmortigas, kaj Margarito de Aŭstrujo, ornamante la tombojn de sia edzo kaj de sia bopatrino, « brodigante sian maŭzoleon kiel fianĉino sian edzinigan robon », elĉerpante por sia tombo la tutan sciencan kaj kapablon de diversnaciaj skulptistoj, antaŭpensis pri la laŭdado de la posteularo. Tiun antaŭpenson pri homa senmorteco la Mezepoko tute ne konis; tia sento estas propraĵo de la epoko Renaskiĝa, kaj tial Brou estas transirepoka monumento.

Brou estas ankaŭ diversstila verko. La franca, flandra kaj itala artoj tie sin renkontas kaj plej ofte harmoniigas. Pro tiuj kaŭzoj tiu monumento, dum ankorau longa vico da jaroj, stimulos la scivolemon

kaj instigos la observadon de la scienculoj, arĥitekturistoj kaj artistoj.

M.-J. EVROT.



Kl. Legay, en Bourg

MAŬZOLEO DE MARGARITO DE AŬSTRUJO.

PROPONO DE S^o MOSSMANN.

Atlestimata Sinjoro kaj kumbatalanto,

« Permesu ke mi komuniku al vi ekpenson eble facile realigeblan, kiu certe alvarbus multajn legantojn al « Tra la Mondo. » Jara elspezo da ok frankoj unufoje timigas multe da homoj, kiuj, kontraŭe, elspezus volonte 75 cent. ĉiumonate por via laŭdeginda kaj subteninda revuo.

Kial vi ne provus disvendi ĝin ponumere, kiel disvendiĝas la plejmulto de l'illustrataj gazetoj nacilingvaj? Certa mi estas, ke en Vesoul, kie nia grupo datumas apenaŭ de kvin monatoj, pli ol dek numeroj estus aĉetataj, jam de nun, kiel estas aĉetataj regule « Femina », « Je sais tout », « la vie heureuse », k. t. p. Petante vin, ke vi bonvolu pripensi mian proponon, kaj ĝin rigardi kiel pruvon de sindonemo ambaŭ por Esperanto kaj via bonega ĵurnalo, mi restas kun kora sento via.

P. MOSSMANN.

Prezidanto de l' Vezula grupo.

Ni tiom rigardas la proponon kiel amika, ke ni eleitas ĝin tute. Kaj ni estis feliĉaj ankaŭ vidi, ke personoj aliaj ol ni konsideras ke intereso de Esperanto postulas disvastiĝon kaj disvastigon de « Tra la Mondo ».

De longe ni pripensis la aferon, sed profitoj postulatitaj de centraj peruloj estas tiel grandaj, ke ni tute ne povus pagi ilin, riskante vendi ne sufiĉe da ekzempleroj.

Kaj ni, oh ve! ne estas kaj ne estos de longe sufiĉe multaj en nia abonintaro, por povi pagi skribiston por kunrilati la apartajn librovendistojn.

Pro tio ni decidis krei kvaronjarajn abonojn sufiĉe facile pageblajn.

Plue, tre volonte, ni sendos al la grupoj arojn da numeroj, se ili bonvolas preni sur sin la vendadon aŭ la demeton ĉe libristojn; sed estus necese ke, ĉiumonate, ni sciis tre proksimume la espereblan vendadon de nia gazeto, por ne elspezi senutile.

Ni dankas antaŭe la grupestrarojn kaj la profesorojn, kiuj bonvolos nin helpi vendigante difinitan nombron da ĉiu el la numeroj de la revuo.

Ni rimarkigu, ke la vendado en la kunvena ĉambro estus okazo por tien venigi anojn de l' grupoj, kiujn oni ne plu vidas post la 3^a aŭ 4^a kunsidoj.

Ni preparas grandan konkurson en la sama celo.

Francujo.

Du pentristoj, famaj en la tuta mondo, ĵus mortis en tempinterspaco da kelkaj semajnoj. Ni donas ĉi apude la portreton de unu kaj ĉefverkon de l' alia.

Sajnas al ni interesa represi apud la desegnita portreto la skribitan, kiun la unua naskis.

Tiuj kelkaj linioj, atentigantaj pri la apartaĵoj de l' artisto kaj sintezantaj lian talenton estas skribitaj en 1838, kiam li ĝuis plenposedon de tiu ĉi.

Ili estas ŝuldataj al sinjoro E. Montrosier, la distinginda artkritikisto, kies verkoj: « La modernaj artistoj », « La ĉefverkoj de l'arto en Luksemburga Muzeo (Parizo) », « La grandaj pentristoj francaj kaj fremdaj », k. c., certigis la talenton kaj kaŭzas ĝojon de l' libramantoj.

W. Bouguereau

Sinjoro Bouguereau, kiu ne estas « tio, kion vana popolo imagas », estas mirinde prezentita. Ni vidas lin starantan, laŭvizaĝe, kun la piedoj forte premantaj la teron. Li portas jaketon, kaj sur la kapo rondan ĉapelon. La dekstra mano estas enigita en la poŝon de l' pantalono, la maldekstra tenas mallongan pipon. La fizionomio, forte malebena, elmontras la sanon: la okulo estas malica kaj serĉema. Sur la lipoj ombritaj de l' lipharoj kvazaŭ ludas simpatia rideto.

Tiel staranta, kun plena kvieteco pri sia forto, certa pri sia famo tiel labore akirita, S^o Bouguereau altiras; kaj tuj, tiu kiu, de longe, kutimiĝis kun la verkoj de l' samtempuloj, revivas la pasintajn jarojn, la verkojn pentritajn, la triumtojn aklamatajn, la malprosperojn, el kiuj oni faras falegojn; kaj li haltas, nedecida kaj pensema. Ĉu li ne havas, antaŭ la rigardo, faman homon, la pentrinton de l' kristaj legendoj, la kantinton de l' fa-



Guth. des.

W. BOUGUEREAU.
El « Le Salon Illustré »

Rousseau sk.

Francujo.

beloj de l' Idolepoko, la kreinton de simboloj, la nelacigeblan pioniron irantan indiferece de Paradizo al Olimpo, de l' Sepdolora Virgolino al Venuso devenanta el la ŝaumo de l' maroj

S^o Bouguereau havas mistikan idealon kaj idealon idolanan; li bruligas la sanktan aromon antaŭ la respektigaj altaroj, se li elvokas la Romon de l' Turmentitoj; kaj li ĉirkaŭvolvas la rozojn kaj la mirtojn je l' frunto de siaj heroinoj, se li malantaŭiras al Grekujo de l' poetoj!

Nedube, en siaj entreprenoj li trafis la graciecon kaj belecon; ĉu li ĉiam renkontis la elokventon kaj la forton? Tie ĉi mi tion ne volas diri en tiu ĉi prozera dediĉita por ĉirkaŭi per diskreta konturo la profilon de konvinkemulo. Tamen, por fini tiun perpluman skizon, kies ĉefajn liniojn desegnis la fantazio, mi dezirus al ĝi miksi kelkajn realaĵojn, kaj, uzante la privilegion de l' kritikisto, aldoni al kranonitaĵo de l' desegnisto strekon ĉerpitan el mia propra sako (2) kaj tiam, mi revus vesti la ampleksan buston de l' personaĵo per vestaĵo el bubalo, traportanta larĝan glavportilon, kovri lian kranion per feltaĵo ĝibhavanta; kaj la pentristo de « Teogonioj » kaj de « Panateneoj » aliformiĝus subite en unu el « la ĝojaj kunuloj », al kiuj la genio de Hals (3) donis la senmortecon!

EUGÈNE MONTROSIER.
Esperantigita de lia filo.

J.-J. Henner.

La vera artisto ĵus mortinta estis amanto de la beleco kaj de l' homa formo. Li ĝin amis kiel idolana skulptisto kaj ankaŭ koloristo, kaj, kiel diris S^o Gabriel Sérailles, li faris el la belecco de la karno la superaĵon de tiuj harmonioj en kiuj, meze de bluoj nekrudigitaj kaj de profundaj nigroj kantas ĝiaj blankoj. « La fontano » estas taksata unu el liaj plej admirindaj verkoj.

Italujo.

La famega Torina tenoro, komandoro Francesko Tamagno, kies nomon la tuta mondo konas, mortis en Varese la 31an del' lasta Aŭgusto, matene. La morto de tiu-ĉi mirinda artisto estas gravega perdo por la teatra mondo.

Grafo A. GALLOIS.



El « Les Annales


Politiques et littéraires. »

LA FONTANO, de J. J. HENNER.

(1) Ni tre deziras ricevi ĉiujn artistajn aŭ literaturajn el ĉiuj landoj.

(2) Galicismo.

(3) Fama Holanda pentristo.



Fotog. Tarniquet.

UNUA AKTO DE LA HEREZISTOJ.

“ La Herezistoj ” ĉe la Arenoj en Beziers'o. (1)

de Fraŭlino JOHANINO FLOURENS.

La 27^{an} kaj 29^{an} de Aŭgusto, Beziers'o estis ĝojega. Kiel la antaŭajn jarojn, je l'sama epoko, blovadis vento de gaja frenézeco. Niaj elegantaj kafejoj estis plenegaj, kaj oni aŭdis bruegon, kian nur la suĉo estas kapabla produkti. La promenantoj sin movis kiel formikoj sur la Aleoj Paul — Riquet kiuj memorigas la « Cours Belsunce » en Marsejo, kaj la « Rambla » en Barcelono.

Antaŭ la prezentado multaj fremduloj vizitis la kvartalon de l' famaj mortigadoj okazintaj en la 1209^a jaro kaj la labirinton de ĝiaj stratoj mallargaj: stratoj de la « Juiverie », de la « Albigeois », « Trencavel », k.c., kies anguloj montras ankoraŭ l'embuskon kaj la timon de l'atako; kaj la katedron Sankta Nazaire, kun ĝia dika turo kvadrata, fortikigita, kaj provizita de budetoj, vera gardistaro de la urbo.

Sed estas la horo de la ludado; ĉiu eniru la templon de l'arto. Tuj de la komenco, la poeto forigas iom de la historia vereco; li sin lasas konduki de sia revo. Sur granda placo estas publikaj festoj, kiam monahino, Almelys, aperas por riproĉi la popolon pri ĝia vanteco. Ŝia fratino, Belissende, penadas kvietigi ŝin; sed la religiulino petas, ke ŝi donu

saĝajn konsilojn al sia edzo, grafo Roger Trencavel. La dolĉa virino iras do al Roger, kiu respondas nur amparolojn, kiujn ŝi ne volas aŭskulti. Daphné konsolas lin; sed la krucmilitistoj alproksimiĝas. Peteginte la pardonon de Roger, Belissende reiras al li, kaj lin trovas amindumantan la belan idolon. Daphné deiras, kaj lasas la geedzojn. La grafo rifuzas kapitulaci. Li do batalas; lia armeo estas venkita, kaj li estas mortigita de S. de Montfort. Belissende ponardas sin sur la korpo de sia edzo dum oni ekflamigas la urbon. Tiu finiĝo okazas kiam la suno eksubiras, kaj la ĉeestantoj sentas la impreson dramatan, kaj tiun sentatan de ĉiu estaĵo, kiam la noktuvalo ekkovras la teron.

La popolamaso postulis ke sur la scenejon venu la aŭtoroj, la geaktoroj kaj la Beziersa Meceno (2). Kiam ĉi tiu kisis la ravegajn kantistinojn, tiam estis surdiga tondro de aplaŭdoj kaj ĝojaj krioj.

Tiu spektaklo estas la triumfo de l'arto. Beziers'o aldonis pluan floretan al sia artista krono.

JOHANINO FLOURENS.

Beziers'o, la 11^{an} de septembro 05.

(1) Epizodo de l' militado de l' « Albigeois », je la XIII^a centjaro.

(2) S^o Bauxhortes.

FELIETONO

La Rememoroj. (1)

de KAZI GIREJ (Manĵurio).

La doktoro, ne ricevinte respondon kaj vidante ke mi estas laca, foriras.

Mi kuŝas silenta, senmova kaj rigardas ĉirkaŭ la ĉambron, mian malliberejon, en kiu mi konas bonege ĉiun objekton, ĉiun anguleton.

Jen mia rigardo falas sur la gazeton, kiun mia patrino forgesis sur la seĝo. Mi petas doni al mi la gazeton kaj komencas legi la « anoncojn ». La legado de anoncoj plaĉas al mi, ĉar tiuj-ĉi ne ekscitas miajn nervojn kaj tamen ili fortiras mian saĝon de ĝiaj malgajaj, turmentaj pensoj. Ah, jen estas io nova por mi, kaj interesa: mi vidas la anoncon: « Esperanto, lingvo internacia. »

Oni alsendas la lernolibron po du dudekcentimaj poŝtmarkoj. « La postulojn oni petas adresi al... » Antaŭ tiu-ĉi momento, mi neniam pensis pri la « internaciaj lingvoj », kvankam mi legis iam pri « Volapük », kaj ŝajne ankaŭ pri « Esperanto », sed neniam intencis konatiĝi kun ili. Kial mi ankaŭ ne povus konatiĝi kun ili?

Nun mi decidis skribi laŭ la adreso presita en la anonco kaj peti elsendi al mi la lernolibron. La patrino skribis por mi la leteron, kaj mi komencis senpacience atendi la respondon.

Dume, mia malsano faris la rondon kaj mia humoro komencis ankaŭ pliboniĝi. La ĝoja antaŭsento, ke la danĝero pasis, ke mi restos viva, eniris en mian animon, ŝanĝis la esprimon de mia vizaĝo, farinte ĝin pli gaja kaj eĉ iom ridetanta. Kaj ĉio en mia loĝejo kvazaŭ lumiĝis, kvazaŭ pleniĝis per suno, per ĝojo.

II.

Pasis du semajnoj, kaj unu fojon la patrino eniris en mian ĉambron, tenante en la manoj malgrandan verdan libreton. Mi ekĝojis, kiel infano. Mi prenis la libreton kaj komencis avida trarigardi ĝin.

Tio-ĉi estis unu el malnovaj eldonoj de esperanta lernolibro, kiu jam ne ekzistas plu, kaj ĝi estis la plej bona eldono el ĉiuj, kiujn mi ĝis nun vidis. La antaŭparolo en ĝi estis skribita en du lingvoj: en mia gepatra kaj en Esperanto. Ankaŭ en du lingvoj estis skribita en ĝi nia bonega himno « Espero ». Mi tra legis ĝin kaj estis ravita per ĝia majesta, nobla karaktero, per la beleco de ĝia lingvo, per ĝia morala beleco kaj fariĝis tiam en mia animo vera esperantano. Tiam ŝajnis al mi, ke la homo, ekkoninta Esperanton, ne povas ne fariĝi Esperantisto kaj mi komencis ellerni la lingvon. Mi estis tiam juna kaj kredis sincere, ke ĉiuj homoj aŭ almenaŭ la pligranda parto de homoj estas penetrataj de la bonaj deziroj, noblaj intencoj kaj altaj ideoj; kaj ke nur malgranda kvanto da « esceptoj » havas aliajn rigardojn. Jes, mi tiel pensis tiam....

Nun mi pensas iom alie... Nun mi scias, ke la pligranda parto de homoj estas penetrataj de la zorgoj nur pri ilia propra persona bono, kaj nur tre malgranda parteto de « stranguloj » klopodas pri la komuna bono, forgesante sin mem...

Mia ellernado de Esperanto iris samtempe kun mia resaniĝo; mi preskaŭ ne ellasis la libreton el la manoj, kaj kiam la fortoj permesis al mi, mi komencis skribi esperante.

Por aboni la tiaman gazeton « Esperantisto » mi skribis leteron al la aŭtoro de nia lingvo. Mi ne povas priskribi la senton de mia ĝojo, kaj fierecon, kiam mi ricevis la respondan leteron de li.

Ekkoninte mian nomon, li supozis, ke mi estas Tataro, kaj demandis ĉu mi povas traduki la esperantan lernolibron en la lingvon de mia patro, la lingvon tataran.

Je mia honto, mi ne scias la lingvon de mia patro! kaj mi respondis nee.

La doktoro, kiu nun vizitadis min jam ne tiel ofte, unu fojon demandis min pri Esperanto; li petis min doni al li la lernolibron por unu tago, por konatiĝi kun la lingvo. Mi donis al li la libreton kaj li returnis ĝin al mi la sekvantan matenon. Je mia demado, ĉu ekplaĉis al li la lingvo, li respondis trankvile.

« Jes, ĝi estas sufiĉe interesa... » Mi ne kontentigis per tia respondo, kaj demandis lin denove « Ĉu vi ne trovas, ke tiu-ĉi afero estas ne sole « interesa » sed ke ĝi estas senfine utila, bona, grandaga laŭ la ideo? » — « Jes, li diris, la « ideo » de la lingvo estas bona; povas esti, ke la lingvo mem ankaŭ estas bona, sed ĉu vi kredas ke tiu-ĉi lingvo baldaŭ fariĝos efektive la tutmonda? Ĉu jam multe da Esperantistoj estas nun en la mondo? kaj kian utilon mi povas tuj eltiri el Esperanto, se mi ellernas ĝin nun? » La demandoj estis tiel « praktikaj », ke mi komprenis, ke mi havas la aferon kun unu el la « esceptoj », t. e. homoj nenormalaj, ĉar normala homo laŭ mia opinio devas ja ĉiam akceli la tutmondan bonon. Tamen mi respondis al li ke nenia afero povos esti aranĝita, se ĉiu deziras eniri en ĝin nur tiam, kiam la plimulto de aliaj homoj jam estos enirintaj en ĝin antaŭe! Ĉar vi ne rifuzas la utilecon de la ideo mem, kial do vi ne deziras subteni la komencon de la afero? — La doktoro respondis al mi ion, el kio mi komprenis, ke li ne deziras daŭrigi tiun-ĉi interparolon, kaj ni ŝanĝis la temon. Iom post iom, mi komprenis, ke li min rigardis tiam, kiel ian « strangulon ». Mi estis por li « strangulo » ĉar mi varmiĝis kaj klopodis por afero, kiu ne estis profita por mi.

(Daŭrenta.)

KAZI GIREJ.

(1) Sekvo.

MIKS AJ O J .



El « De Lusthof »

Por la propagando.

Kio'n vi vid'as sur la apud'a desegn'aj'o ?
 — Sur la apud'a desegn'aj'o, mi vid'as kvar (4) person'o'j'n': tri (3) sinjor'o'j'n kaj unu (1) sinjor'in'o'n.
 — Kie ili trov'ig'as ?
 — Ili trov'ig'as en vend'ej'o aŭ magazen'o.
 — Kiel est'as la du antaŭ'a'j sinjor'o'j ?
 — La du antaŭ'a'j sinjor'o'j tute ne simil'as: unu est'as dik'a, elegant'e vest'it'a; la alia est'as mal'dik'a kaj li port'as vest'o'n tut'e simpl'a'n. La unu'a ŝajn'as esti riĉ'a aĉet'ant'o; la du'a, humil'a vend'ist'o.
 — Kaj la sinjor'in'o ? Kio'n vi opini'as pri ŝi ?
 — Mi opini'as ke ŝi est'as aĉet'ant'in'o, kiu dezir'as aĉet'i la tut'an magazen'o'n!

TRA LA MONDO.

REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^o Ĉiuj amuzajoj, problemoj kun siaj solvoj, proponotaj en « Tra la Mondo », devas esti sendataj al sinjoro Brunet Ch. 59 cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu bonvolis preni sur sin la redaktadon de la paĝo « Miksajoj ».

2^o Krom esceptoj speciale direktaj, la solvoj devos esti sendataj al s^{ro} Brunet en maksimuma templimo da 15 tagoj post la ricevo de la Revuo.

La komparo de l' poŝtmarkoj ebligos kontroli ĉu tiu ĉi kondiĉo estas plenumita.


Tiel agante, ĉiuj divenintoj, eĉ la plej malproksimaj, povos sendi la solvojn de ili trovitajn.

3^o Divenintoj estos ordigataj kvaronjare laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estos donacataj al la plej sagacaj.

4^o Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝos specialajn premiojn.

PROBLEMO 6^a (DE NAZUMULO).

KAVALIRIRADO.



Komenco estas: ONI.

PROBLEMO 7^a.



El « De Lusthof »

Kie estas la glitantino?

PROBLEMO 8^a (DE NAZUMULO).

Trovu nur unu vorton sed elektu ĝin tiamaniere ke oni povu legi en ĝi kiel eble plej multe da vortoj. Ekzemplo: KAVALIRO en kiu oni legas: Kav — av — val — alir — lir — ir —. La vorto en kiu oni legos plej multe da vortoj estos la gajnanta. (La vortoj devas esti legeblaj per literoj unu post la alia; do oni ne povas diri, en suprecitata ekzemplo: kal — vir —).

**

En ekspozicio antaŭ pentraĵo.

- Kion signifas tio ?
- La pasadon tra la Ruĝa Maro de la Israelidoj.
- Kaj kie estas la Maro ?
- Ĝi, jam foriris !
- Kaj la Israelidoj ?
- Ili jam pasis.
- Kaj la Egiptoj ?
- Ili venos poste.

10072.

AL NIAJ KUNLABORANTOJ.

Pri kiu ajn rubriko oni bonvolu ĉiam skribi sur apartajn foliojn kaj nur sur unu solan flankon de ili.

Baldaŭ « ŜAKLUDADO » de nia konata propagandisto J. Ellis, el Keighley (ANGLUJO).

Anoncoj kaj reklamoj.

« Tra la Mondo », irante en ĉiujn landojn, enpresos anoncojn ĉiulingvajn. Sed la komerca publikigo per Esperanto estas, nedube, la plej taŭga.

PROFITOJ DE LA ESPERANTA PUBLIKIGO. — Ĝi prezentas grandegan profiton kompare je la publikigo per naciaj lingvoj: kontraŭe je tio, kio ofte okazas pri tiu lasta, ĝi estas ĉiam legata, estante legada ekzerco, kaj lernado (pri la teknikaj vortoj) por la adeptoj de la helpa lingvo.

Plie, ĝi donas eniron en ĉiujn landojn al komercistoj ĝin uzantaj.

Ni do tre atentigas la komercistojn pri la utilo de l'esperanta publikigo.

Prezo de nia publikigo.

Anoncoj	{	De 1 ĝis 3	1 fr.	ĉiulinie.
		3 ĝis 6	0 fr. 90 c	»
		6 ĝis 12	0 fr. 75 c	»
Paĝoj	{	1 paĝo	140 fr.	
		3 paĝoj ĉiujare	125 fr.	
		6 paĝoj almenaŭ, ĉiujare,	100 fr.	

Reklamoj. — 3 fr. ĉiulinie, kun traduko.

Linimezurilo 7-punkta, kolono da 6,5 centimetroj.

Aviso. — Por publikigo en lingvoj aliaj ol la franca kaj Esperanta, estas rekomendate sendi klišaĵojn, aŭ almenaŭ *presitajn* tekstojn. La klišaĵoj estas devigitaj por la lingvoj ne uzantaj, tipografie, la francajn preslitojn.

ĴUS APERINTA!

FRANÇOIS COPPEE

Unua Ĉapitro

de miaj memorskriboj

ESPERANTIGITA DE
AUGUSTE MONTROSIER



PREZO: 75 CENTIMOJ

PARIS
ALPHONSE LEMERRE, ELDONISTO
23-25, PASSAGE CHOISEUL, 23-25
D. DECELY

Ĉarma verketo de l' fama franca akademiano, kun antaŭparolo tute aproba por Esperanto.

Ĉe « Tra la Mondo ».

Belegaj propagandaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de Alĝerio;
I fr., aŭfrankite, ĉiu dekduo.

Propagandaj poŝtkartoj de « Tra la Mondo », fr. 1,50 ĉiu centoj.

ĈE « TRA LA MONDO ».



Legu en n° 9 de *ESPERANTO* la kondiĉojn detalojn de la unua granda konkurso malfermita inter ĉiuj legantoj. — Facilega por ĉiu! — mu premioj! —

UNUA PREMIO:

BICIKLETO

je supera kvalito. — marko Esperanta.

La Gazeto « Esperanto » estas vendebla en ĉi stacidomoj francaj aŭ ĉe:

S^o Administranto de « Esperanto »

EN CERET, S. O., FRANCE.

BULONJA KONGRESO.

Ĉiuj kiuj deziras memoraĵojn de nia grava kongreso bezonos nur sin turni al la lerta fotografisto, speciale komisiita por akompani DOKTORON ZAMENHOF kaj la kongresanojn dum liaj migradoj.

S^{ro} Caudeville, aŭtoro de l'interesaj kongresaj fotografaĵoj presitaj en tiu numero de « TRA LA MONDO » ricevis viziton de D^{ro} Zamenhof je la fino de l' kongreso kaj faris portreton plenvivan de l'majstro. Jen estas la kostoj de tiu portreto, tute rekomendinda pro ĝia simileco:

Albumformato	{	brila	2 frankojn.
		nebrila	3 »
Formato 30/40 centimetrojn,			10 »

S^{ro} CAUDEVILLE, 7, Rue des Carreaux, Boulogne-sur-Mer (Pas de Calais) France.
Oni bonvolu sendi monon kun la mendoj.

L'ILLUSTRATION

La plej bela, la plej bone kaj rapide sciigata el ĉiuj francilingvaj ilustrataj gazetoj (ĉiusemajna).

Multaj senpagaj aldonoj: muzika, arta, literatura, k. t. p.

Jara abono) Francujo: 36 fr. (9 fr. por unu kvaronjaro)
) Fremdlandoj: 48 fr. (12 fr. por unu kvaronjaro.)
Sin turni 13, RUE ST GEORGES, PARIS.

La malgrandaj anoncoj de « Tra la Mondo ».

Tra la Mondo organizas « anoncetojn » dank' al kiuj ĝiaj legantoj povos facile interkorespondadi. Tiuj anoncetoj enhavas du kategoriojn, t. e.:

1^o La ANONCETOJ PRIVATAJ, pri servproponoj, petoj por oficoj aŭ laboroj (lecionoj, kursoj, geservistoj, k. t. p...);
La proponoj por interŝanĝoj (poŝtkartoj, poŝtmarkoj, etaĵoj, sportoj, k. t. p...)
La luigoj da apartamentoj, domoj, k. t. p.

4. — Kapitano Capé, 74, Faubourg Bannier, Orléans, ricevos danke, por siaj soldatoj, ĉiujn ajn legindaĵojn, france presitajn.
5. — S^{ro} A. Morin, Santa Rosa Necoxtla, Ver, Meksikujo, havas kelkajn maloftajn meksikajn poŝtmarkojn kiujn li volonte interŝanĝus por maloftaj koloniaj francaj markoj.

2^o LA ANONCETOJ KOMERCAJ, rilataj ĝenerale la vendon de laboraĵoj, duktoj, aŭ specialaĵoj vendataj de komercistoj.

TARIFO.

Por *privataj anoncoj*: 0 f. 15 ĉiuvorte abonintoj kaj 0 f. 30 por neabonintoj.
Por *komercaj anoncoj*: 0 f. 50 ĉiuvorte, ĉiuj gelegantoj.

Poŝtmarkoj!!

6. — Sved — Dan — Norveg — Finlandaj alilandaj. Miksaĵoj da 200 po 1 fra Multaj *Malnovaj Svedaj* en ĉiu aro, markoj estas sendotaj nur tiar, klar mendo estos akompanata de l' *paĝo poŝta mandato aŭ letero*.
Sin turni al P. Hedström, Rossön, Sved (Li ne estas filatelisto).

Sendu mendojn kaj anoncojn kun poŝtaj mandatoj al « Administranto de Tra la Mondo » 15 Boulevard des 2 Gares, Meudon (S. et O.), France, antaŭ la 15^a de ĉiu monato, por la venonta numero.

ĈIAM TRE LEGBLE SKRIBU.

A. J. WITTERYCK, Presisto, Brug